Justinus Kerner,

La plej riĉa princo

tradukita de Manfred Retzlaff

Siajn landojn laŭdegante
|:De l' princaro konsili':|[2]
|:Sidis iam en la halo:|
|:De l' germana imperi'.:|

"Ja belegas mia lando,"
|:Jen la princo de Saksi'.:|
|:"Multe da arĝenta erco:|
|:En la montoj havas mi.":|

"Belas ankaŭ mia lando",
|:La Rejn-princo gloras sin.:|
|:"Ora greno en la valoj,:|
|:Sur la montoj nobla vin"'.:|

La sinjor' de Bavario
|:Diris: "Riĉas ankaŭ mi.:|
|:Laŭ trezoroj estas riĉa:|
|:Mia lando ne malpli.":|

Eberhardo, la barbulo,
|:Virtemberga la sinjor',:|
|:Diris: "Ja en mia lando:|
|:Estas nek arĝent' nek or'.:|

Sed ĝi tamen estas riĉa,
|:Trezoregon havas ĝi::|
|:Ke al subularo mia:|
|:Ja konfidi povas mi.":|

Diris la sinjor' Saksia,
|:De l' Rejnland', de Bavari':|
|:"Vi barbula graf', plej riĉa:|
|:El ni ĉiuj estas vi!":|

. . .

[2] aŭ:
|:La princara konsili'|:

Traduko de la Germana poemo "Der reichste Fürst" de Justinus Kerner *(∗1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

Arg-929-1864 (2013-10-09 18:59:42)

La poemo estas kantebla la jena melodio: http://www.politikundunterricht.de/2_3_01/M_hymnen.htm#fuerst*. Tie ĝi estas ankaŭ aŭdebla. Ĝi estas la Virtemberga himno. La muziknotoj troviĝas ankaŭ en* http://www.volksliederarchiv.de/notenpdfs/1999.pdf*.*